

# Svisa Esperanto-Societo informas

jaro 2014 numero 3-a: julio-oktobro 2014  
dissendo je la 15-a de aŭgusto



Fotis Mireille Grosjean

En tiu ĉi loko, la Universitato de Neuchâtel, okazos la  
Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto  
en majo 2015.



Tre regule CDELI ricevas vizitantojn aŭ esplorantojn. Jen Claude Gacond montranta la bibliotekon al Monique Arnaud kaj Renée Triolle venintaj al Les Brenets por kunsidi kun Mireille Grosjean. (Vidu la paĝon 21-an.)



Stefano Keller, Claude kaj Andrée Gacond prezentas al Renée Triolle la aktivecon de CDELI.





# Svisa kalendaro

Ankaŭ vizitu la retan version de la kalendaro prizorgata de Luc Allemand  
[www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro](http://www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro)

## Septembre

1 : *Lausanne* : LES-kunveno kun A. Cherpillod.  
3 : *Wil* : EKW-kunveno kun Mireille Grosjean.  
6-7 : *Chaux-de-Fonds & La Sagne* : CDELI :  
Kultura Semajnfino kun André Cherpillod.  
12 : *Bovernier / Martigny* : Esperanto-kurso.  
13 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.  
25 : *Basel* : ESB-kunveno.

## Oktobre

4 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI : Metodika kleriĝo  
kun Claude Gacond pri la strukturŝanĝa didaktiko.  
6 : *Lausanne* : LES-kunveno.  
17-19 : *Vordemwald* . 7-a SFERO kaj 1-a kanto-  
konkurso.  
23 : *Basel* : ESB-kunveno.

## Novembre

3 : *Lausanne* : LES-kunveno.  
15 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.  
24 kaj 27 : *Basel* : ESB-kunvenoj.

## Decembre

3 : *Wil* : EKW-rakledvespero.  
6 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI : Metodika kleriĝo  
kun Claude Gacond pri la strukturŝanĝa didaktiko.  
6 : *Basel* : ESB-kunveno.  
13 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.  
13 : *Lausanne* : Zamenhofa Festo.

## Januare 2015

17 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.

## Februare

2 : *Lausanne* : Ĝenerala asembleo.  
21 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.

## Marte

21 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.

## Maje

13 : *Neuchâtel* : Ĝenerala Kunveno de SES.  
13-16 : *Neuchâtel-La Chaux-de-Fonds* : 3-a Tut-  
monda Konferenco pri Instruado de Esperanto.

## Organizantoj de kursoj kaj stud-kunvenoj

*Basel* : *Esperanto-Societo Basel* : PF 178, 4005 Basel, tel : 0049 76 214 57 12.

*La Chaux-de-Fonds* : *CDELI*, Bibliothèque de la Ville, strato Progrès 33, CP 3034,  
2303 La Chaux-de-Fonds. [claude.gacond@ne.ch](mailto:claude.gacond@ne.ch) , tel : 032 967 68 42.

*CDELI-Studsabatoj* : Aliĝo ĝis la mardo antaŭ la koncerna studsabato ĉe Nancy  
Fontannaz . Rete : [nancy.fontannaz@gmail.com](mailto:nancy.fontannaz@gmail.com) , tel : 021 728 31 27.

*Lausanne* : *Laŭzana Esperanto-Societo* : CP 246, 1000 Lausanne 22.

[www.esperanto-lausanne.ch](http://www.esperanto-lausanne.ch) , tel : 021 647 29 28. [www.eo-l.ch](http://www.eo-l.ch) .

*Genève* : *Grupo La Stelo* : CP 734, 1212 Grand-Lancy 1, tel : 022 771 24 37.

kaj *Asocio Esperanto-Genève-Régions* : [esperantoegr@gmail.com](mailto:esperantoegr@gmail.com) .

*Neuchâtel* : Luc Allemand : [luc.allemand@bluewin.ch](mailto:luc.allemand@bluewin.ch) .

*Wil* : *Esperanto-Klubo* : <http://esperanto.ch/wil> .

# Rememorigilo

## SES informas

### Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils 14,  
CH-2300 La Chaux-de-Fonds  
Retpoŝto : gacond@bluewin.ch  
Tel. : hejme: 032 926 52 32  
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:  
Nancy Fontannaz, Stefano Keller,  
Richard Schneller.

### Redaktaj datlimoj

2014-4 : novembro-decembro :  
oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

Ekde 2015 Dietrich Weidmann  
transprenos la redaktadon de la bulteno.  
En la venonta novembra bulteno li  
indikos sian redaktan programon.

### Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

## SES-estraro

Estraro atingblas per : ses@esperanto.ch

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue  
9, CP 9, 2416 Les Brenets.  
Tel.: 032 932 18 88 kaj 079 69 709 66.  
Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.  
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25.  
Retpoŝto : info@esperanto.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por  
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,  
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25. Zorgas ĉefe  
pri SFERO.

Sonia Daubercies, Coin d'En Bas 5, 1092  
Belmont-sur-Lausanne. Tel. : 021 728 26 51  
kaj 079 649 88 86. Zorgas ĉefe pri organizado  
de eventoj.

Dieter Rooke, Kreuzimaatweg 20, 3812  
Wilderswil. Tel. : 078 637 18 41.

Komisiito pri financoj: Oxana Grazhdanova,  
Léopold-Robert 12, 2300 La Chaux-de-  
Fonds. Tel. : 076 533 21 76.

*Kontonumero de SES (POSTFINANCE)*  
Svisa Esperanto-Societo  
2300 La Chaux-de-Fonds  
17-581908-4  
(por kotizoj kaj donacoj)

Konsultu la retejon de SES !

[www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch)



# Vivo de SES

*Redaktis Claude Gacond*

Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto Societo SES  
Dimanĉe la 18-an de majo 2014  
Yverdon-les-Bains, restoracio La Grange (en la blanka Casino)

## Protokolo de la Ĝenerala Kunveno

**Tagordero 1:** Bonvenigo, kontrolo de la ĉeestantoj kaj anonco pri senkulpiĝoj.  
Anonco pri registrado.

Antaŭ la formala malfermo de la kunsido okazis kanta prezentaĵo de la Svisa Esperanto-Koruso.

La korusanoj gvidataj de Jean-Thierry Von Büren



Fotis Claude Gacond

Post tio Mireille Grosjean solene malfermis la kunsidon.

Senkulpiĝis ges-roj Dorotea kaj Carlo Baumgartner, s-ro Ernst Glättli, s-ro Istvan Morocz, s-ro Stefano Keller, s-ino Nelida Weidmann, s-ino Andréa Gacond, s-ino Ruth van Puijenbroek.

Memore pri Gertrud Eggenberger, kiu forpasis la 19-an de februaro 2014, la asembleo stariĝis dum momento en silento.

Mireille Grosjean malferme prezentas afiŝon pri Jules Verne.



Fotis Claude Gacond

**Tagordero 2:** Aprobo de la tagordo.

La Tagordo publikigita en *SES informas* n-ro 2014-1 sur paĝoj 5 kaj 6 estis sen modifoj unuanime akceptita.

**Tagordero 3:** Elekto de la protokolanto.

Ueli Haenni estis elektita kiel protokolanto.

**Tagordero 4:** Elekto de la voĉnombrantoj.

Elektiĝas interkonsente, laŭ propono, la voĉnombrantoj, Barbara Pochanke kaj Nancy Fontannaz.

**Tagordero 5:** Evoluo de la membraro.

Membraro-nombro ne ŝanĝiĝis multe. Aldoniĝis nova membro nun ĉeestanta, Marcel Chevalley, dum ne plu membras, kiel jam menciite, Gertrud Eggenberger.

**Tagordero 6:** Aprobo de la protokolo de la ĝenerala kunveno 2013.



Ne estis komento. La protokolo de la ĝenerala kunveno en Staad 2013 estis unuanime akceptita.

**Tagordero 7:** Vivo de la societo : Aprobo de la estrarraporto.  
La estrarraporto akceptiĝis kun unu sindeteno kaj neniuj kontraŭa voĉo.

**Tagordero 8:** Konsisto de la estraro. Elektioj.  
Denove sin prezentas por reelektio la ĝisnunaj kunprezidantoj Dietrich Michael Weidmann kaj Mireille Grosjean, kaj la respondeculino por konkurso, SFERO kaj junularo Nelida Weidmann. Ne plu kandidatiĝas la kasistino Marie-Louise Mürger pro sia sanstato kaj retiriĝas la komisiito Hans-Werner Grossmann, kiu zorgis pri la financaj aferoj. Nove anoncis sian pretecon por kunlaboro en la estraro Dieter Rooke kaj Sonia Daubercies. La tri ĝis-nunaj kaj la du novaj kandidatoj estis unuanime elektitaj aŭ respektive reelektitaj. Daŭre vakas la posteno de la kasisto. Ĝis la trovo de nova komisiito la kunprezidantoj provizore prizorgos la kason.  
La kunveno esprimis apartan dankon al Marie-Louise Mürger pro ŝia longdaŭra kunlaboro.

### Atenta kunsidantaro



Fotis Claude Gacond

**Tagordero 9:** Raporto de la laborgrupo pri statutmodifo.  
Dietrich Michael Weidmann informas, ke la projekto ampleksi la celaron de SES nuntempe ne jam estas matura por diskuto.

**Tagordero 10:** Financoj. Prezento de la jarkalkulo kaj ties aprobo.  
Estis esprimita kritiko pri la deficitaj. Dietrich Weidmann atentigis, ke la elspezo de la sumo de 9'000.- CHF por la valorigo de la son-dokumentoj de D-ro Arthur Baur en

la sonarkivo de CDELI estis decidita de la ĝenerala asembleo 2012 en Vevey, kontraŭ la voĉoj de la estraranoj. La estraro per tiu elspezo plenigis la ordonon de la asembleo, sed ne havis liberecon. Tiun deficiton oni nun ne povas riproĉi al la estraro. Bruno Graf diris, ke pri la valorigado li pore voĉdonis, sed ke nun li bedaŭras. Laŭ sia aserto li blinde jesis. Li ŝatus scii, en kio konsistis la laboro de Stefano Keller kaj kiom da horoj tiu laboris por la valorigado de la radio-elsendoj de Arthur Baur. Respondas Claude Gacond, ke por tipa elsendo de 10 minutoj da radie elsendita daŭro bezono estis de 90 minutoj. Protokolanto rezonas, ke ne plu ekzistas la skribaj, nur la sonaj memoraĵoj, do oni devis interalie retajpi la vortojn laŭ tio, kio de la sonbendoj aŭdiĝas. Per la 9'000.- CHF ĝis hodiaŭ elspeziĝis 7750.- por eble 375 horoj kun kosto de po 24.- CHF. Dietrich Weidmann atentigas, ke sendepende, kion oni opinias pri la farita laboro kaj elspezo, oni konsciu, ke tiuj sondokumentoj, memkompreneble, havas certan valoron kaj estas nun en la retejo de CDELI je publika dispono. Oni do almenaŭ uzu tiujn dokumentojn. Dietrich Weidmann ekzemple komencis aldoni intervikipediaj ligilojn kiel referencoj al la unuopaj prelegoj. Tio estas tre valoraj esperantlingvaj sonfontoj en vikipediaj artikoloj pri Svislando. Estis farita la propono, ke oni faru apartan alvokon, ke membroj povas donaci cele al la sonarkivo, kaj ke do la restanta sumo de 1250.- CHF de la deciditaj 9000.- CHF estu pagitaj el tiuj donacoj. Post fino de la debato kun subteno al tiu propono la jarkalkulo estis akceptita kun 19 poraj, neniuj kontraŭaj kaj du sindetenaj voĉoj kaj estis senŝarĝita la estraro.

**Tagordero 11:** Elekto de la kaskontrolantoj.

Per aplaŭdo elektiĝis kiel novaj kaskontrolantoj Benno Frauchiger el Berno kaj Ueli Haenni el Zollikofen. La malnovaj kaskontrolantoj Barbara Pochanke kaj Dieter Rooke estis kun aplaŭdo kaj danko senŝarĝitaj.

**Tagordero 12:** Projektoj por 2014 (informo).

12, 1) Sabate-dimanĉe la 6-7ajn de septembro: Semajnfino kun André Cherpillod en La Chaux-de-Fonds kaj La Sagne, vidu en *SES informas*.

12, 2) SFERO okazos de la 17-a ĝis la 19-a de oktobro en Vordemwald en Centro Adonia, Argovio. Paralele al SFERO okazos la 1-a Svisa Esperanto-Junularo-Kantokonkurso. Pliaj informoj sekvas en la reto en junio kaj en *SES informas*. La finalo de la konkurso okazos en Centro Adonia la 18-an de oktobro. En la buĝeto lastjara estis por la konkurso rezervita la sumo de Fr. 4000.- kaj aliaj Fr. 1000.- estos metitaj en la buĝeto 2014.

**Tagordero 13:** Projekto por 2015 (informo).

Bonvolu jam rezervi la datojn en 2015, de la 13-a ĝis la 16-a de majo, por la Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto en Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds. Oni krome notu, ke la venontjara ĝenerala kunveno de SES okazos antaŭ la malfermo de la Kolokvo, merkredon la 13-an posttagmeze.



**Tagordero 14:** JES (junuloj), SIS (Svisa ILEI-sekcio), SAT, SAT-Amikaro, Pasporta Servo k.s.

Estis anoncite, ke JES formale malfondis la junularan asocion kiel memstaran organizaĵon kaj ke ĝia mono estis ĝirita al SES, kiu nun ĝin favore al junularaj aktivecoj administras. Sekvis informoj pri SIS, kaj aliaj institucioj.

**Tagordero 15:** Buĝeto 2014.

Estis decidite prezenti pli ekvilibrantan buĝeton. Tial oni reduktis la proponitajn 5'000.- CHF por varbado al 2'000.- kaj samtempe altigis la celon por ricevotaj donacoj de CHF 1'500.- CHF al 2'500.-. Tiel la buĝetitaj plielspezoj estis malaltigitaj de 6'000.- al 3'000.- Kun tiuj modifoj la buĝeto estis akceptita kun unu kontraŭa voĉdono kaj unu sindeteno.

**Tagordero 16:** Diversaĵoj.

Ne estis peto de parolo.

La kunsido finiĝis je la 12h40.

Protokolis Ueli Haenni. Reviziis la estraro de SES.

-oOo-

## Aldonaj informoj

Maldekstre de la Iverdona blanka Kazino en la Restoracio *La Grange* okazis do la Ĝenerala Kunveno de SES kun 25 partoprenantoj ; temis pri internacia kunveno kun po unu persono el Francio kaj el Katalunio.



Fotis Claude Gacond

La kultura programo temis pri prelego koncerne al la nuna politika evoluo de Hispanio kaj Katalunio, kiu tendencas al aŭtonomiĝo reage al la tro centralisma politiko de Hispanio kontraŭa al ĉiaj federaciaj proponoj. Pri tio interese raportis Sinjoro Ramon Perera el Barcelono.

## Sinjoro Ramon Perera preleganta pri Katalunio



Fotis Claude Gacond

La dua kultura aktiveco konsistis el vizito al la muzeo “*La Maison d’Ailleurs*” dediĉita al sciencfikciaj aferoj, kie estas salono pri Jules Verne, franca verkisto mondfama, kiu metis Esperanton centre de sia lasta verko. Tiu muzeo ricevis jam antaŭe ĉiujn verkojn de Jules Verne en Esperanto.

La tria kultura aktiveco estis la ekspozicio pri Esperanto dum la unua mondmilito preparita de Josette Ducloyer el Montfort sur Meu, Bretonio. Kaj kiel kutime la Svisa Esperanto-Koruso kantis en Esperanto ĝojigante tiel ĉiujn partoprenantojn.

-oOo-

## Bruno Graf esprimas personajn impresojn pri la jarkunveno

Jarkunvenoj similiĝas, tamen estas diferencoj kaj apartaĵoj. La mondo ja daŭre ŝanĝiĝas, ankaŭ la esperanta. Ĉiam estas iom da tensio en la aero, ĉar oni ne scias, kiel la membroj reagos, ĉu kontentos aŭ malkontentos. Feliĉe ni havas komunan lingvon por diskuti kaj disputi. Germanlingvanoj povas pli facile esprimi sin en esperanto ol en la franca, franclingvanoj pli bone ol en la germana. Ĉiufoje okazas tiu pentekosta miraklo, kie ĉiuj parolas la saman lingvon. Ne ĉiuj same bone, sed oni komprenas unu la alian.

Esepte la kunveno okazis dimanĉe - kiel en fruaj jaroj - la 18-an de majo, tiel membroj, kiuj laboras sabate, povis partopreni. Ne venis pli da personoj, eble kelkaj ne venis, ĉar estis dimanĉo. Evidente ne gravas, ĉu estas sabato aŭ dimanĉo. Ekzistas

fidela adeptaro. Mi atendis pli da vizitantoj, ĉar ni kunvenis en Romandio, kie ni estas pli multnombraj.

La tiujara asembleo okazis en Yverdon, en blanka palaco proksime de la stacidomo. Jes oni anoncis asembleon, ne jarkunvenon, kiel antaŭ jaroj. La francdevena vorto estas preferita de franclingvanoj, laŭ la statuto temas pri ĝenerala kunveno. Diskuto aŭ disputo pri lingvaj demandoj malofte estiĝas. Esperanto ne estas artefarita por ni, iĝis tute natura lingvo.

Kiu atendas, ke aroj da partoprenantoj jam renkontiĝas en la fervojaj vagonoj, estas iluziigita. La membronombro ŝrumpis kaj hodiaŭ averaĝe nur 25 membroj kuniĝas. Oni salutas sin reciproke kiel amikoj kaj konatoj, kaj se venas novulo, ekestas aparta intereso por tiu persono. Antaŭ 50 jaroj estis same, sed ariĝis 50 homoj. Ĉiam la partoprenantoj estis plimulte maljunaj kaj junulo troviĝas en maljunuleja ĉirkaŭo. Ĉu pro tio mankas gejunuloj? Ne nepre. Sed mi malkovris alian fenomenon: oni konstatas, ke tiu aŭ alia pliaĝiĝis, dum oni mem sentas sin same juna kiel ĉiam. Vera sintrompo. Kaj ĉar homoj hodiaŭ iĝas pli aĝaj, ankaŭ esperantistoj vivas pli longe.

En la pasinteco ĉiam regis prezidanto aŭ prezidantino. Nun gvidas du kunprezidantoj, ili alterne parolas, unu kompletigas la alian. Mi longe dubis, ĉu tiu modelo funkcias. Ĝi funkcias almenaŭ ĝis nun, danke al kompromisa sinteno kaj toleremo. Du kunprezidantoj estas pli fortaj ol unu, kaj mi kalkulus du-oble unu estas tri. Estas plia avantaĝo: unu povas aktivi, la alia povas pasivi. Unu estas franclingva, la alia germanlingva, tiel ili povas pli bone reagi al demandoj de ĵurnalistoj. Estis tempoj, kiam oni ĉiam devis serĉi prezidantojn, nun ni havas du, kia bonŝanco!

Sed en la estraro estas granda truo, ĉar mankas kasisto. Kasisto estas same grava kiel prezidanto, ĉar nur enordaj financoj permesas sukcesan agadon. La ĝisnuna kasisto malŝatis kverelojn – esperantistoj estas homoj kaj homoj kverelas – kaj preferis kasisti nur kiel komisiito ekstere de la estraro. La problemo estas konata en esperantio: asocioj kaj grupoj havas pli kaj pli da peno trovi gvidantojn kaj responsulojn. UEA nun lanĉis kampanjon: plikapabligi aktivulojn. Eble vi legis en la revuo *Esperanto* pri la AMO-agado. Ne temas pri amo, sed pri **aktivula maturigo**.

Tiun jaron ni kverelis pro troaj elspezoj, kiujn la asembleo mem aprobis. Ne estas katastrofo, nur akcidento. Mi furioziĝis lastjare, kiam mi legis, ke la asembleo akceptis buĝeton kun minuso de 16'550 fr. Ni ne staris antaŭ defia projekto kiel siatempe la *Svisa Enciklopedio Planlingva*, kie ni investis 10'000 fr. Ni decidis spontane, sen plano kaj kalkulo, enretigi la radioprelegojn de Arthur Baur. Tio sumiĝis al 10'000 fr. sen ke ni generas enspezojn. La societo tro ofte deficitis kaj la kapitalo malaltiĝis senteble. *Heroldo de Esperanto* kritikeme prognozis, ke ĝi estos foruzita en 2020, se oni daŭrigas plielspezi kiel ĝis nun.

Ja estas bone, aktivi kaj uzi la monon, sed la rimedoj estas limigitaj. Entute SES enspezas jare nur 7'000 fr., ne multe por tutsvisa societo. Tial la estraro kolektas aparte monon por difinitaj projektoj. Kaj la redaktoro de la bulteno estas sufiĉe ruza, regule aldoni enpagilon al la informilo. Se la mono ne sufiĉas, oni „ŝtelas“ de la kapitalo. Oni kutimiĝis dekomence buĝeti deficiton.

Tiujare okazis elektoj de la estraro kaj kaskontrolantoj. Novaj fortoj kompletigas la estraron, sed kasisto ne troviĝis. Ĉio bone disvolviĝis, sed mi miris pri la kielo. Mi



sentis min en ĝenerala kunveno de Glarus aŭ Appenzell, nomita Landsgemeinde, kie oni voĉdonas publike pri aferoj kaj kandidatoj. La kunprezidantoj elektigis sin ne sekrete, restante en la salono, demandante ĉu vi estas por aŭ kontraŭ ni. Kie restas la diskreteco ?

Ĉu ni havas perspektivon ? Mi iom zorgas, ĉar la svisa movado estas malforta, la grupoj vegetas, la junulara asocio JES estas ĵus malfondita. Almenaŭ ni havas kelkajn batalantojn. Mireille Grosjean estas lokomotivo, oni devas eĉ bremsi ŝin. Claude Gacond depost jaroj redaktas la bultenon honorofice, ankaŭ multobligas kaj dissendas ĝin. Se ni devus pagi la redaktoron kaj la presiston, niaj elspezoj estus ankoraŭ pli altaj. Oni devas simple agnoski, ke nia influpovo estas limigita, ankaŭ se ni havus pli da mono.

Mi estas pli optimisma rilate la internacian movadon. Momente UEA havas du celkonsciajn gvidantojn : prezidanto Mark Fettes kaj vicprezidanto Stefan MacGill. Ili lanĉis novan strategian planon, kiu estas promesplena. La teorio estas bona bazo, sed la praktiko decidus. Esperanto estas pli defendebla sur internacia tavolo, ol sur nacia. La celo ja estas faciligi la internaciajn komunikadon kaj interkompreniĝon. Kaj venis nova redaktoro de la revuo *Esperanto*, Fabricio Valle el Brazilo, kiu estas fantaziema kaj entuziasma. Li kreis kun specialistoj tute modernan revuon, se vi ankoraŭ ne estas membro de UEA, nun estas la momento por aliĝi. Vi ricevos ĉiumonate la plej atrakcian esperantan gazeton.

Bruno Graf

-oOo-

## **Ĝenerala Kunveno de SES 2015, antaŭanonco**

Ĉar la malfermo de la **Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto** okazos merkrede la 13-an de majo je la 19a horo, ni planas la ĝeneralan kunvenon en la sama urbo Neuchâtel je la 15a horo. Okazos je 17h45 komuna vespermanĝo kaj la partoprenantoj povos atingi la aŭlon de la universitato por ĉeesti la malfermon. La loko estos en vasta domo strato Léon-Berthoud 8 (Vidu foton kovrilpaĝe). Estas ne pozitive okazigi tian kunvenon iun merkredon; tamen pro la tre malofta okazigo de tutmonda kolokvo, ni opinias, ke tio estas la plej bona solvo.

La estraro de SES.

# Tria Tutmonda Konferenco pri Instruado de Esperanto

Invito iris de eta Ŝtato, konkrete de la Respubliko kaj Kantono de Neuchâtel, Svislando, al ĉiuj Ŝtatoj de la mondo. En la kantono Neuchâtel troviĝas la ĉefurbo Neuchâtel kaj la urbo La Chaux-de-Fonds, kie ekzistas CDELI, grava arkivejo pri planlingvoj. En tiuj du urboj okazos la Kolokvo. (En la franca : “Conférence”; en Esperanto “Kolokvo”, ĉar ILEI okazigas ĉiun jaron Konferencon). La datoj estas de la **13-a ĝis 16-a de majo 2015**, do en la jubilea jaro UNESKO-ESPERANTO Montevideo 60.

La unua tia Konferenco okazis en Ĝenevo en 1922, la dua en Prago en 1927. Estos la tria.

ILEI estas la organizanto. La Kolokvo okazas sub la aŭspicioj de Svisa Esperanto-Societo kaj de Universala Esperanto Asocio.

Naskiĝis laborgrupo por pripensi la enhavon de tiu grava kunveno. Ĝi konsistas el Duncan Charters, Mark Fettes, Mireille Grosjean kaj Humphrey Tonkin.

## **Celoj de la Kolokvo.**

- Kolekti prezenton de la nuntempaj metodoj uzataj por lerni.
- Kolekti prezenton de la nuntempaj metodoj uzataj por instrui.
- Agnoskoj de Eo en la diversaj instrusistemoj, diplomigo pri Eo, estontaj paŝoj por evoluigi kaj firmigi tiun aspekton.
- Instruista trejnado : kiel plibonigi ĝin kaj diplomigi novajn instruistojn.
- Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto (lernhelpa efiko) ilo al enkonduko por lingvoinstruado.
- Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto kiel elemento en politiko de multlingvismo. Evoluigi strategiojn ĉirilate.
- Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto en la kampoj de psikologio, akiro de interkulturaj kapabloj, solidareco, toleremo, malfermi la mondon al infanoj.
- Kiel kaj kiom Esperanto povas kontribui al la jarmilaj celoj de Unesko kaj UN en la kampoj de alfabetigo kaj daŭripova evoluo ?
- Diversaj pedagogimovadoj (Freinet kaj aliaj) en rilato kun Esperanto.
- Interŝanĝo de spertoj.
- Renkontiĝo kun lokaj fakuloj.

Ni povas supozi, ke ne venos ŝtatestroj aŭ edukministroj. Sed eble partoprenos kulturaj ataŝeoj, kiuj la tutan jaron laboras en la svisa ĉefurbo Berno.

La Kolokvo estos anoncita en la Universitato kaj la publiko, gestudentoj kaj aliaj, havos senpagan aliron al la prelegoj. La salono enhavas 440 sidlokojn.

Multaj esperantistoj kaptos la okazon veni al Svislando por ekscii pri la nuntempa evoluo de la instruado de Esperanto kaj pri la estontaj ebloj.

Personoj, kiuj pretas helpi al la organizado anoncu sin al Mireille Grosjean, la prezidanto de Kolokva Organiza Komitato.

Mireille Grosjean, Prezidanto de ILEI.

-oOo-

### ALVOKO AL TRADUKANTOJ

En La Chaux-de-Fonds staras muzeo pri historio. Ĝi nun renoviĝas, fine de la jaro 2014 ĝi malfermiĝos denove. La novaj ekspozicioj ricevos tradukojn al la itala, hispana, portugala kaj turka, kaj Esperanto ! Luko Allemand transprenis la taskon kaj ricevos la saman dankmonon kiel la tradukistoj al la aliaj lingvoj. Granda agnosko por nia lingvo. Kadre de la Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto, kiu okazos en majo 2015, ni provas proponi tradukojn al aliaj muzeoj.

En La Chaux-de-Fonds : muzeo pri artoj.

En Neuchâtel : muzeo pri artoj, muzeo pri etnografio, muzeo pri prahistorio “Latenium”.

Por ĉiu muzeo ni preparu 1-2-paĝan prezenton.

Ĉu vi pretas helpi en tiu laboro ? Ĉar la muzeoj disponas ankaŭ pri germanlingvaj klarigoj, iuj povas eklabori. Bonvolu anonci vin ĉe Mireille Grosjean, prezidanto de la Kolokva Organiza Komitato de la Tutmonda Kolokvo 2015.

-oOo-

## Nova redaktoreco de SES informas ekde 2015

Dietrich Weidmann sciigis al mi komence de junio, ke li pretus transpreni la redaktoradon de nia bulteno *SES informas* ekde la venonta jaro 2015, ekklarigante samtempe sian projekton de duobla redaktora formulo pri bulteno kun malsimilaj versioj presita kaj reta.

Mi ĝojas, ke la kunprezidanto de SES pretos malŝarĝi min el mia redaktora funkcio komenciĝinta en 1995 per laborrimedoj, kiuj aperas al la nuntempuloj kiel ege primitivaj. Historieto de mia redaktora aktiveco aperonta en la venonta bulteno iel raportos pri la eksterordinara evoluo de la gazetaj eldonebloj.

Kaj certe novaj labor-formuloj povos eĉ signifi novan progreson por SES. Sed gravas antaŭ ĉio, ke papera apero de la bulteno restu fundamenta fronte al la efemereco mem de la riĉaĵoj de la retaj ebloj.

Kiel arkivisto de CDELI mi konstatas, ke fakte nur tra sia papera versio publikaĵoj restas konsulteblaj, dum ties retaj aperoj rapide perdiĝas en neniecon. La memoro de societo persistas tra siaj presitaj dokumentoj reale arkiveblaj kaj plu esprimeblaj, dum ĉiuj retaĵoj baldaŭ sinkas en morton definitivan. Almenaŭ tiel estas ĝis nun.

Claude Gacond



# Svisa vivo

## Venontaj renkontoj

Septembra semajnfino kun André Cherpillod  
je la 6-7aj de septembro  
en La Chaux-de-Fonds kaj La Sagne

**La semajnfino 6-an kaj 7-an de septembro nia preleganto estos la verkisto kaj eldonisto André Cherpillod**, kiu estas verŝajne unu el la plej kleraj nuntempaj esperantistoj. Pri liaj publikaĵoj posedataj de CDELI ekpozicieto donos superrigardon. Ili kovras vastan esplor-kampon pri etimologio, leksikologio, esperantologio kaj planlingvistiko, gramatiko, tradukado kaj tradukarto, historio kaj prihistoriaj kaj prireligiaj esploroj, pedagogio kaj instruado de esperanto, beletraj studoj kaj tradukaĵoj, ktp. Estas vera privilegio rehavi la okazon lin renkonti kaj reaŭskulti.

Liaj ĉi-fojaj prelegtemoj refoje atestos pri la plureco de liaj konoj. Ili estos :

- 1. La eksterordinara diverseco de la lingvoj.**
- 2. Gaston Waringhien, la lumturo de Esperanto.**
- 3. De mazdaismo al katarismo: la dualismaj religioj.**

Jen la detala programo kaj horaro de ambaŭ tagoj disvolviĝontaj en La Chaux-de-Fonds ĉe CDELI kaj en La Sagne ĉe la Hotelo von Bergen.

### *Horaro de la sabato 6-a de septembro*

**10.00 : Malfermo de la salono de CDELI** je la 2-a etaĝo de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds (strato Progrès 33).

Verkoj de André Cherpillod, aliaj libroj kaj brokantaĵoj aĉeteblos.

**10.30 - 12.45 : Prelego de André Cherpillod pri la diverseco de la lingvoj.**  
(kafo-paŭzo : 11.15 - 11.45)

13.00 - 14.00 : Komuna tagmanĝo ĉe la najbara piceja restoracio Ital-Panini. (Ĉiu tuj ricevos sian menuon telefone menditan el CDELI mem.)

**14.15 – 16.30 : Prelego de André Cherpillod pri Gaston Waringhien, la lumturo de Esperanto.** (te-paŭzo : 15.00 - 15.30)

Trajna veturo al La Sagne gvidata de Stefano Keller. (Horaro : La Chaux-de-Fonds forveturo 17.04, La Sagne alveno 17.18)

17.30 : Rendevuo en La Sagne ĉe la Hotelo von Bergen.

La tranoktemuloj mendu kiel eble plej rapide sian ĉambrojn tra la kanalo de Claude Gacond : tel. : 032 926.52.32 aŭ rete : [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch) .Tranokta prezo kun matenmanĝo : Unulita ĉambro : CHF 70.- Dulita ĉambro : CHF 120.- (Dum tiu periodo viglas la turismo, do ne prokrastu vian lit-rezervadon.)

**18.30 : Komuna vespermanĝo en la Hotelo von Bergen :** Eta salato, funga kokida eltranĉaĵo, nudeloj, legomaĵoj. Por la vegetaranoj sama menuo senvianda kun pli da legomoj. Prezo : CHF 15.- Trinkajaĵoj kaj desertoj individue mendeblaj.

**20.00 : Kuna interkona kaj amika vespero** dum kiu bonvenos rakontoj pri partopreno al esperanto-kongreso, en alitipa feria aranĝo aŭ en propra vojaĝo. Stefano Keller pretos projekcii la fotojn, kiujn la rakontantoj alportos per komputila memorbastoneto USB.

### *Horaro de la dimanĉo 7-a de septembro*

08.30 – 09.00 : Matenmanĝo inkludita en la tranokta prezo. Prezo por netranoktinto : 15.- CHF.

09.00 : Dimanĉa renkontiĝo en la Hotelo von Bergen.

10.00 – 11h30 : **Prelego de André Cherpillod pri : De mazdaismo al katarismo : la dualismaj religioj.** Trinkajaĵoj mendeblaj.

12.00 : **Komuna tagmanĝo du-menua je la prezo 21.50 CHF.**

a) Fonduo.

b) Eta salato, porko-rostaĵo, karotoj, terpomoj velursaŭcaj. Por la vegetaranoj sama menuo senvianda kun pli da legomoj. Trinkajaĵoj kaj desertoj individue mendeblaj.

14.00 : Kuniĝo por komuna promenado al la torfejo de Les Ponts-de-Martel pade bele aranĝita kun ekspoziciaĵoj.

Trajna forveturo el La Sagne : 14.18. Alveno en Les Ponts-de-Martel : 14.27.

14.30 : Ekpromenado en la torfejo.

16.00 : Konkludo de la promenado elire de la torfejo.

16.32 : Trajna forveturo el Les Ponts-de-Martel. 16.56 : Alveno en La Chaux-de-Fonds kun trajnrilateblo al Neuchâtel aŭ Biel/Bienne je la 17.02.

(Okaze de nekonvena vetero anstataŭa posttagmeza programo en La Sagne ĉe la Hotelo von Bergen.)

Aliĝo al la tuta renkonto aŭ nur al parto de la programo direktiĝu kiel eble plej rapide al Claude Gacond prefere rete [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch) aŭ telefone 032 926 52 32. Partopren-kosto : CHF 20.- Por parta partopreno : CHF 15.-

La trajnveturantoj tranoktontaj en La Sagne mendu bileton ne nur al La Chaux-de-Fonds, sed ĝis La Sagne.

El la stacidomo de La Chaux-de-Fonds la Biblioteko atingeblas per la buso 304, direkto Hôpital.

Claude Gacond, kiu pretas respondi rete aŭ telefone al eblaj informpetoj kaj antaŭgigas akcepti la aliĝojn.

-oOo-

## Venontaj Kulturaj Sabatoj dediĉitaj al metodika formiĝo al la strukturŝanĝa didaktiko kaj utiligo de la instruafiŝaro.

4-a de oktobro kaj 6-a de decembro.

**Tiuj kulturaj sabatoj estos dediĉitaj al la esperanto-instruado strukturŝanĝa per la didaktika afiŝaro.** La koncerna instru-materialo estas ege efika komplemento al la tradicia instruado de esperanto, eĉ se ĝia terminaro tendencas emancipiĝi el la terminologia tradicio greklatina, kiu fakte ne konvene priskribas la funkciadon de esperanto. Instruistoj kaj kurs-gvidantoj certe pedagogie **multe profitos el tiuj metodologiaj sabatoj.** Same lernemuloj, kiuj celas perfektigi sin lingve kaj gramatike povos pli bone kompreni la funkciadon de la lingvo.

Al la kurs-kotizo de CHF 20.- por kultura sabato aldoniĝos la kosto de po 10 centimoj por folio je formato-A4, ĉu de la instru-afiŝoj kaj ĉu de la konsilataj ekzercoj. Sed tiuj dokumentoj plej ofte kapteblas rete.

Tiuj prezoj koncernas la personojn, kiuj antaŭ-anoncos sian partoprenon. Sed tio ne malhelpu la partoprenon al ne-aliĝintoj. Ili simple pagos CHF 30.- por kultura sabato.

Eblas jam konatiĝi kun la menciita didaktika afiŝaro, kaj eĉ mem reprodukti ĝin, tra la kanalo de la retejo [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch). Sed aldone al la konsulteblaj afiŝoj ĝis nun mankas la necesaj metodikaj konsiloj, kiujn Claude Gacond siatempe parole donis al la pedagogoj, kiujn li didaktike formadis.

Nun revenis la tempo por pretiĝi al la efika utiligo de tiu instru-afiŝaro. Tial la eblaj interesatoj rezervu la menciitajn sabatojn en sia kalendaro kaj sin anoncu tra la kanalo de la retadreso [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch).

Ankaŭ parta partopreno eblas. Do kiuj ne povis ĉeesti la antaŭajn renkontojn, tiuj tamen bone profitos el la sekvaj sabatoj 4-a de oktobro kaj 6-a de decembro.

-oOo-

## 7-a Svisa Feria kaj Familia Esperanto-Renkontiĝo 17-a ĝis 19-a de oktobro 2014 en Vordemwald, Argovio

Ni kore invitas vin al SFERO, kiu okazos en Vordemwald (Argovio, Svisio) de la 17a ĝis la 19a de oktobro!



Tiu esperanto-renkontiĝo celas kunigi kaj familiojn, kiuj uzas esperanton hejme, kaj homojn, kiuj ŝatas la familian etoson. Kune, ni ĝuos grupan semajnfinojn, dum kiu ni ludos, promenos, kuiras, babilos.

Jam la 7-an fojon okazos la tradicia renkontiĝo en familia rondo ĉi-foje en la centro Adonio proksime de Zofingo en Argovio. Rezervu jam la datojn. Dum la 7-a SFERO okazos la unua Svisa Esperanto-Junular-Kanto-konkurso. Pliaj informoj aperos baldaŭ en la retejo de SES.

Detalajn informojn kaj la aliĝilon vi trovos en la reto, tuj kiam tio pretos sub :  
<http://esperanto.ch/sfero>

Ni loĝos en la domo [Adonia](#) en Vordemwald, Argovio. Plie, okazos speciala evento sabate: [la unua Svisa Esperanto-Junularo-Kantokonkurso por junuloj](#).

Venu diskuti pri SFERO en nia [Facebook grupo](#)!

Amike salutas Marion Bélisle nome de la organiza teamo.

### Ejo de la 7-a SFERO en Vordemwald



Fotis Dietrich Michael Weidmann

-oOo-

# CDELI

## Venontaj Studsabatoj

13-a de septembro, 15-a de novembro kaj 13-a de decembro. La oktobra renkonto estas nuligita por favori la partoprenon al la 7a SFERO.

(Mendu kaj diskonigu la detalan informilon.)

-oOo-

# Loka vivo

## Basel

*Esperanto-Societo Basel*

Postfach 178, 4005 Basel  
esperantobasel@gmx.ch

### **Venontaj kunvenoj :**

Lunde 25-an de septembro : Saint-Louis Babilado „La Fadeno“ ekde la 19a horo en la restoracio La Poste en Saint-Louis.

Ĵaŭde 23-an de oktobro : Monata kunveno en Riehenring 131: Babilado kaj ludoj.

Lunde 24-an de novembro : Saint-Louis Babilado „La Fadeno“ ekde la 19-a horo en la restoracio La Poste en Saint-Louis.

Jaŭde 27-an de novembro : Programo en Riehenring 131 ekde la 20h15.

Sabate 6-an de decembro : Zamenhofa festo en Svislando.

-oOo-

## Genève

Esperanto-Grupo *La Stelo*  
1200 Genève : lastelo@gmail.com

-oOo-

## La Chaux-de-Fonds

*Sabate la 18an de majo 2014 okazis en La Chaux-de-Fonds, Svislando, en la lernejo La Granda Ursino la tutmonda sesio de KER-ekzamenoj kun 9 kandidatoj. Samtempe okazis en la urba biblioteko en CDELI la kutima studsabato, kiu okazadas ĉiun trian sabaton de la monato. Tie kunvenis 8 personoj. Je la 14a horo alvenis tie kelkaj*

kandidatoj de la KER-ekzamena sesio, kiuj estis ne ankoraŭ sufiĉe lacaj... Ili studis kun la aliaj studentoj ĝis la 16a 30.

-oOo-

## Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo  
Société lausannoise d'espéranto  
Poŝtfako / case postale 246 \* 1000 Lausanne 22  
[www.esperanto-lausanne.ch](http://www.esperanto-lausanne.ch) \* +41 21 647 29 28 \* [www.eo-l.ch](http://www.eo-l.ch)

### **Venontaj kunvenoj**

Lunde, la 1-an de septembro je la 20-a, ĉe la unua etaĝo de la laŭzana stacidoma bufedo **André Cherpillod** prelegos al ni pri *ig – iĝ – po – um*.

### **Lunde la 6-an de oktobro**

*Esperantaj gramatikaĵoj kaj nialingvaj malfacilaĵoj.*

### **Lunde la 3-an de novembro**

*Sébastien Moret parolos al ni pri esperantologio kaj lingvistiko.*

### **Sabate, la 13-an de decembro**

*Zamenhofa Festo en la nova loko de USL en Ouchy.*

### **Lunde la 5-an de januaro 2015**

*Decidota*

### **Lunde la 2-an de februaro**

*Ĝenerala asembleo ordinara*

## **Jara ekskurso al Arkeo de Noa en Vicques (JU)**

Sabate la 28-an de julio okazis nia kutima jara ekskurso. Je la 8-a la partoprenantoj rendezuis sur la autoparkejo « Vélodrome ». La vetero pli malpli belis, sed feliĉe ne pluvis.

Ni, la 13 fideluloj, enaŭtiĝis, direkte al Ĵuraso. Ni decidis halti por kafumado en la Neuveville, borde de la neŭŝatela lago. Ni atingis nian elektitan celon, « la Arkeo de Noa », en Vicques apud Delémont, proksimume je la 11-a. Antaŭ la pordo 2 ĝirafoj kaj flanke 2 elefantoj – naturskalaj - atendis nin. Surloke Sinjoro Schneiter – la pajloŝtopisto - bonvenigis nin.

Nia gastiganto tuj klarigis, ke la vorto “pajloŝtopi” ne plu estas aktuala, ĉar nun en moderna tempo oni ne plu uzas pajlon sed kemian materialon, sorto de sek-ŝaŭmo, kiu estas pli facile uzebla. Hodiaŭ oni diras “naturigi – naturigisto”. Li tre afable kaj pasie klarigis al ni pri siaj profesiaj teknikoj.

Post filmeto, kiu montras la artiston en faro, ni vizitis la ekspozicion – kreitan de li mem - kie troviĝas pli ol 2'500 bestoj el 5 kontinentoj. Mirigas nin sovaĝ- kaj farmbestoj, grandaj, malgrandaj ... neniuj mankas. Ni promenadis tra la tuta “natura ensceniĝo”, malkovrante familiojn de tigroj, lupoj, hienoj, blankaj kaj brunaj ursoj, rangiferoj, simioj, ktp. Eĉ unu buntkolora vestita masajo, brutgardisto, aperis meze de la leonoj. En la ĉambro de la nekredeblaj kaj fabelaj bestoj, ankaŭ Harry Potter staris kun sia strigo “Hedviĝo” surŝultre.

Vere mirinda estas la multnombro da birdoj. Gigantaj, grandaj, malgrandaj, nigraj, brunaj, blankaj ĉeestas ... sed la plej mirindaj estas la papagoj buntaj kaj belkoloraj.

Ĉiu el ni multe plezuris malkovri kaj rigardi tiun bestaron. Impresis nin la originaleco kaj la kvalito de la laboro de Sinjoro Schneiter por krei iluzion de vivo.

Oni povas rimarki, ke li estas vera artisto, ĉar ĉiu besto montriĝas laŭ sia plej bela flanko.

Kun multe da steloj en la okuloj ni piknikis en iu ŝirmita loko, ĉar pluvis. Dum la reira vojo ni haltis en Bieno. Françoise Péterman, nia kasisto, kiu naskiĝis tiuregione, gvidis nin tra la malnova urbo, rimarkigante belajn placojn, stratetojn, domojn. Plezurigis al ni malkovri tiun urbon sub bela suno kaj blua ĉielo ... inter du pluveroj. Post lasta trinkaĵo ni adiaŭis antaŭ ol reveni hejmen. Estis vere ege simpatia etoso.

La organizantoj esperas, ke ĉiu el vi konservos bonan rememoron el tiu ekskurso kaj dankas vin pro via ĉeesto.

Charlotte Blanc Maillard.

-oOo-

## Les Brenets

Grupo de tri fakuloj laboras pri unuecigo de pedagogiaj terminoj.

De la 2-a ĝis la 5-a de junio ili kunvenis en Les Brenets : Monique Arnaud, Mireille Grosjean kaj Renée Triolle. Ili alportis konojn pri instrusistemoj de plej diversaj landoj : Anglujo, Francio, Japanio, Rusio, Skotlando, Svislando, Usono.

La celo de tiu laboro ne estas malpermesi al homoj en unuopaj landoj uzi la kutimajn tradukojn de la naciaj terminoj, sed krei komunan ilon por faciligi la interkompreniĝon inter esperantistaj instruistoj kaj legantoj de *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) k.s.

Mireille Grosjean, la prezidanto de ILEI.

-oOo-

## Neuchâtel

### Esperanto-renkontiĝoj

Ekde oktobro 2013 troviĝas homoj en Neuchâtel ĝenerale la unuan mardon de ĉiu monato por lerni kaj praktiki esperanton. La renkontiĝo komenciĝas pli-malpli je 18h45 per komuna vespermanĝo, kaj sekve okazas kurso aŭ alia esperanto-aktiveco laŭ la partoprenantoj.

Nuntempe tio okazas ĉe Luc Allemand, **strato Léon-Berthoud 8**. Ĝis nun ĉefe venis komencantoj, inter unu kaj kvar personoj, do mia kurso orientiĝas por ili, sed laŭ kiu venas, tio povas ŝanĝiĝi... Mi ankaŭ ĝojus foje havi aliajn spertajn esperantistojn, kiuj venos grandigi la grupon kaj eble prezenti ion.

Alia esperanto-vespero en Neuchâtel okazas ĝenerale ĉiun lastan mardon monate en *Café des Langues*, de 18h30 ĝis 20h00. *Café des Langues* (lingva kafejo) estas lingvaj renkontiĝoj okazantaj en *Café du Cerf*, iu kafejo en la urbocentro.



Okazas tie praktikado de la itala, hispana, angla, germana, kaj ekde januaro 2014 ankaŭ de esperanto. Ne nepre necesas regi la lingvon bone por partopreni, kaj por la esperanta kunveno eĉ ne necesas paroli ĝin : Venas esperantistoj por iom paroli en esperanto, sed ankaŭ venas interesatoj, kun kiuj ni parolas pri esperanto en la franca aŭ alia lingvo.

Ĉar en tiu kafejo ne nur venas homoj, kiuj celas nian grupon, sed ankaŭ multaj aliaj lingvemuloj, estas bona okazo sciigi pri esperanto.

Vi trovos pliajn informojn pri la adreso kaj maniero aliĝi sur la facebook-paĝo de *Café des langues*.

Por partopreni iun aŭ alian el tiuj renkontiĝoj, plej bone skribu al mi.

Luc Allemand : luc.allemand@bluewin.ch

## Romantikaĵo

### Nokto kun gufoj kaj vulpoj

Merkrede vespere, je 22.30, post telefono kun mia koramikino estanta enlitiĝonta, venas al mi subite la ideo iri tranokti en la arbaro. Fakte tiu ideo jam aĝas de kelkaj tagoj, sed nun vesperaj eventoj estis ŝanĝigintaj miajn pensojn kaj mi pri naturumado ne plu pensis. Plie laŭ miaj originaj planoj mi jam devintus esti en la arbaro antaŭ noktiĝo.

Sed ne gravas, mallumo ne timigas min. Mi do metas mian piĝamon kaj sport-vestaĵojn supren, kaj enpakas du kovrilojn en dorsosakon : Noktoj ne tiom varmas. Ankaŭ poŝlampon mi kunprenas, kaze ke mi penus retrovi *la lokon* en la arbaro.

Mi eliras, paŝas ĝoje kaj medite tra la lumigitaj sed dezertaj stratetoj de mia kvartalo. Mi atingas arbaron sude de mia hejmo, post futbaltereneto kaj uzinoj. La arbarrando, la fontano, kaj jen arbara obskuro. Mi haltas minuton dum miaj okuloj alkiutimiĝas.

Ie dekstre estas pado sekvenda por foriĝi de la ĉefa vojeto, sed sen lumo mi ne vidos ĝin. Do mi enŝaltas mian lampon, kiu ankaŭ utilos, kiam mi forlasos la padon kaj eniros densan subarbarejon, serĉante la lokon. La lokon, kiun mi serĉas, mi malkovris ĝin en aprilo dum duopa promenado, ni pasigis agrablan momenton tie, kaj nun tie mi intensas instaliĝi por la nokto ; en komforta anguleto sufiĉe for de la civilizacio, nevidebla el la vojetoj.

Malfacilas certi, kie mi devas forlasi la padon, despli nokte. Mi ne havas precizan gvidsignon, sed ŝajne mi pli malpli rekonas. Mi trairas densan arbetan zonon, supreniras iom laŭ miaj impresoj, rekonas grandan abion, duan grandan arbon, kiu devas esti fago, mi proksimiĝas... Jes, estas fago, la fago kaj tuj poste la taksuso, sub kiu troviĝas pli malpli ebena, mortfoli-kovrita spaco, mi retrovis la lokon, mi fieras. Egaliginte teron, aldonante foliojn mi provas plikomfortigi konvenan spacon, kuŝigas kovrilon sur ĝin, kuŝiĝas, kovras min per la dua kovrilo. Noktaj birdoj, vulpo aŭ melo, venteto, mi endormiĝas kun ili.

Mi vekigiĝas, matenaj birdoj kantas, suno leviĝas, mi malmulte dormis. Ses batoj sonoras je urba horloĝturo. Mi kuŝas ankoraŭ horon, mi frostetas sed estas al mi agrable kuŝadi tiel, ĉi-tie. Sed miaj piedoj frostas, mi hejmeniras.

Luc Allemand, 19.06.2014

# Valezo

## FESTIVALO DE LA KVIN KONTINENTOJ en Martigny la 14an de junio.

La organizantoj de la Festivalo sugestis, ke ni havu standon pri Esperanto. Mi informiĝis kaj mendis standon. Mi deĵoris tie kune kun Sonia Daubercies kaj Marguerite Buchard. Bela vetero, dekoj da diversaj standoj pri diversaj kontinentoj kaj agadoj. Granda homamaso en gaja etoso. Internacia komunikado estis en adekvata loko. Multaj homoj vidis niajn banderolojn kaj afiŝojn. Multaj homoj ricevis informilojn. Proksimume 6 personoj volas komenci la studadon de Esperanto. Konsekvence :

### ESPERANTO-KURSO KOMENCIĜOS POST LA SOMERO !

Kurso komenciĝos la 12-an de septembro 2014 (vendrede) je la 19h30 (ĝis la 21h30) en Bovernier, 7 km for de Martigny, atingebla per trajno, ĉe Familio Raymond kaj Franje Bourgeois, miaj geamikoj. Rue des Ecoles 20.

Instruos Sonia Daubercies el Belmont/Lausanne. 10 kursoj okazos dum 10 semajnoj. La tuto kostos CHF 100.-

Bonvolu informi viajn geparencojn kaj gekonatojn!!! Ni ekagu en Valezo!!.

Mireille Grosjean.

-oOo-

## Wil

### *Esperanto-Klubo Wil*

Verena Chaves –Walder, Rosenhügelstrasse 22, 9230 Flawil

Tel. 071 393 41 49, chaves-walder@bluewin.ch

03.09.2014 : Niaj travivaĵoj en Esperantujo : klubanoj rakontas. Nia SES-prezidantino Mireille Grosjean raportas pri esperanto en Afriko.

03.12.2014 : Rakledvespero kun rakontoj kaj kantoj.

Ĉekomence ĉiam disvolviĝas nia rakonta rondo.

La kunvenoj komenciĝas je la 19 horo en b`treff , stacidomo de Flawil.

Antaŭĝojas pri vigla partopreno Verena Chaves-Walder

-oOo-

## Zürich

### *Esperanto-Societo Zuriko*

Ĵaŭdon, la 4-an de septembro 2014

Svedenborg-Centro, Vitra Salono Apollostrasse 14, 8032 Zuriko (Apud Kreuzplatz, 5 minutojn piede de Stadelhofen)


19.30 **Esperanto - lingvo de paco.** Publika prelego pri Esperanto de la SES-kunprezidantino Mireille Grosjean en la germana lingvo. Gastoj tre bonvenas. Eniro senpaga.

Ĵaŭdon, la 25-an de septembro 2014 Kafejo Mandarin, 20.00 h apud Stacidomo Stadelhofen, Zuriko. Libera kunveno kaj kafoklaĉo.

Ĵaŭdon, la 30-an de oktobro 2014 Kafejo Mandarin, 20.00 h apud Stacidomo Stadelhofen, Zuriko. Libera kunveno kaj kafoklaĉo.

Ĵaŭdon, la 27-an de novembro 2014 Kafejo Mandarin, 20.00 h apud Stacidomo Stadelhofen, Zuriko. Libera kunveno kaj kafoklaĉo.

-oOo-



# Al kongresoj kaj vivo tuthomara

## PRI LA 5-A AFRIKA KONGRESO DE ESPERANTO

**“Nun aŭ neniam” opiniis ĉiuj afrikaj gravuloj kaj aktivuloj, kiuj ĉeestis la 5-an Afrikan Kongreson de Esperanto en Kotonuo en Benino de la 29-a de decembro 2013 ĝis la 4-a de januaro 2014. Tiu ĉi Kongreso riviĝis grava kaj historia, kaj solviĝis per grava rezolucio.**

Kiel membro de Afrika Komisiono de UEA kaj reprezentanto de la Sudafrika Esperantujo, mi, Emile Malanda, partoprenis la 5-an Afrikan Kongreson, kiu ankaŭ estis mia unua partopreno kadre de internaciaj Esperanto-aranĝoj. La 5-a Afrika Kongreso de Esperanto estis grava kaj historia evento, kiu reale donis esperon kaj optimismon al ĉiuj Afrikanoj.

La sukceso de tiu okazaĵo estis atribuita al afrikanoj mem. Ili elmontris, ke la unuiĝo de afrikaj esperantistoj eblas kaj la antaŭeniro de Esperanto en la tuta kontinento certas. Varmaj diskutadoj inter afrikanoj prenis lokon dum la Kongreso, dum Mirejo kaj Anita (ambaŭ Eŭropaninoj) silentis. Longajn momentojn neniu el ĉi-lastaj interrompis la debatojn de la afrikanoj, eĉ se ili provis mildigi la fajron de la diskutado. Ĉiuj afrikanoj reagis unuanime: “Nun aŭ neniam por la progreso de Esperanto en Afriko”.

La 5-a Afrika Kongreso de Esperanto kunigis afrikajn esperantistojn el diversaj landoj, pli ol duono de la Landaj Esperanto-Asocioj de UEA en Afriko. Ĉiu reprezentanto rivelis la Esperanto-travivaĵojn ene de sia lando kaj seniluziigis tiujn, kiuj ignoris tion, kio okazas alilande. Sufiĉe montriĝis, ke Esperanto ekzistas en Afriko kaj ke esperantistoj agadas en Afriko. Afrikanoj konsciiĝis, ke Esperanto ne estas monopolo de iu persono aŭ de iu institucio en Afriko, sed tamen de ĉiuj afrikanoj, kiuj lernis kaj utiligas Esperanton.

Rilate al la Kongresa Temo, afrikanoj montris, ke ili kapablas uzi Esperanton kiel kontaktlingvon inter si por la justa komunikado. Jam la belaspekta kongreslibro helpas por trovi la nomojn kaj retadresojn de ĉiuj partoprenintoj de la Kongreso kaj daŭrigi konstante la interŝanĝojn inter afrikanoj. Dume, koncerne la ceteran mondon, afrikaj esperantistoj bezonas efikan kaj regulan kontakton kun la internacia Esperantujo.

La 5-a Afrika Kongreso de Esperanto, kiu iel simboliĝis per la kvinpinta stelo de Esperanto, kroniĝis per la Rezolucio. Tiu rezolucio estas la gvidlinioj sekvindaj de la afrikaj esperantistoj por firmigi la Esperanto-movadon en Afriko. La Afrika Komisiono de UEA, kiel pinta Esperanto-instanco en la tuta kontinento, rajtas dissendi tiun Rezolucion al la landaj asocioj, kluboj kaj fakgrupoj en Afriko; disvolvigi la enhavon de ĉiu ero de la Kongresa Rezolucio; kaj kunordigi ilian aplikadon.

Afrikanoj estis dankemaj al Mireille Grosjean, kiu dediĉis sian tempon kun neelĉerpebla energio favore al ili. Ili ekkonis ŝian elkoran senton al ĉiuj unuopuloj kaj asocioj, kiuj ĉiel helpis.

**Emile Malanda (Membro de Afrika Komisiono de UEA kaj Estrarano de Sudafrika Esperantujo).**

-oOo-

## EDIFA KANTO-SEMAJNO EN FRANCIO por la ĥoranoj el Svislando en la regiono de Ardeŝo

Partoprenis la kanto-semajnon Elisabeth de Mestral, Dominique de Mestral, Verena kaj Gabriel Chaves, Nancy Fontannaz, Nicole Margot, Claire-Marie kaj Bernard Nicolet, Dieter Rooke, Jaqueline Vasserot kun sia edzo. Senkulpiĝis Ueli Haenni, Jun Liu kaj la geedzoj Baumgartner.

Sabate ĉiuj akurate alvenis per propraj veturiloj. Varmkore bonvenigis nin la gastigantoj Elisabeth kaj Dominique. Ni kune frandis abundan vespermanĝon kun tradiciaj pladoj kaj ege bongustaj vinoj. Ĉirkaŭ la tablo ni tostis pro naskiĝtagaj datrevenoj. Multaj ĥoranoj estas nomeblaj „juli-anoj“.

La vetero iomete surprizis nin per pluveto kaj freŝa vento. Tamen ni kuraĝe ekmarŝis al la montopinto sur vojetoj ardeŝaj markitaj per flavaj kaj blankaj strioj. Gvidis nin senerare nia ĥorestro Elisabeth.

Por turistoj oni klarigis sur ŝildo la okazaĵoj de la sangsoifa historio. Iam estis masakritaj protestantoj, ĉar ili defiis la katolikan kredon.



Senĝene ni ĉiutage kolektiĝis en la preĝejo de Fival (kiu tute ne estis fia !). Nun neni plu informiĝas pri nia religia kredo.

Nia repertuaro montris la religian fonon : Enkondukis ĝin Verena per du kantoj por la paco. Sekvis *la valezaj vojetoj*, kiuj kondukas al alta paradizo, la *himno nokta* laŭdas la dian donon, en *la belulino* tiu ĉi kaptis trompitan adoranton, kaj preskaŭ mortigas lin. En angladevena kanto *fajnaj belaĵoj* (ĝi estas aparte malfacile esperantigebla) revas mizerulo-almozulo pri neniam plenumota amodeziro.

La ĵaudan tagon alvenis pro invito fakulo pri ĥorestrado, s-ro Laurent Jouvét. Li instruis nin per verva metodo, kiel kanti pli bele kaj arte. En la germana li uzis la metaforon de larĝfaŭka rano - kaj longfaŭka rano.

Sed mi apenaŭ komprenis, kial longfaŭkaj ranoj kantas pli bele ol ni. Tamen la rezulto estis ege konvinka. Nia ĥoro atingis pli altan nivelon !

La sekvan tagon registriĝis nia kuna kantado sub diligenteco de Elisabeth. Dum vesperoj ni arde diskutis la estontecon de nia kanta grupo. Kiel daŭrigi ĝin, kaj kien ni publike elpaŝu ?

Ni ĉiuj elkore dankas pri la bona organizado de la semajno al Elisabeth kaj Dominique de Mestral

Raportis: Dieter Rooke.

## Intensivaj kursoj en Greziljono

Retejo: <http://gresillon.org/printempo>

Kontakto: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org), +33-2.41.89.10.34, Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ, Francio.

2014-oktobre-24/novembre-01 : AŬTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj.

-oOo-

## Kvinpetalo en Bouresse

Kvinpetalo, 15 rue du Lavoir, FR-86410 Bouresse  
[informoj@kvinpetalo.org](mailto:informoj@kvinpetalo.org) kaj [www.kvinpetalo.org](http://www.kvinpetalo.org)  
organizas menciindajn kursojn kaj renkontojn.

-oOo-

## La 47-a ILEI-Konferenco en Montevideo

En la jaro 2008 ILEI havis sian Konferencon en Porto Novo, Benino. En la parko de la Centro Songhai ([www.songhai.org](http://www.songhai.org)) tiam ni plantis arbon. Tiu oranĝarbo kreskas kaj kreskadas. Tion oni povas konstati en [www.edukado.net](http://www.edukado.net) -> biblioteko -> fotoalbumoj -> ILEI aŭ per klako <http://edukado.net/biblioteko/fotoj?f=1030>

La 47-a Konferenco de ILEI disvolviĝis tre bone en Montevideo (UY). Per bongustaĵoj el niaj 26 landoj ĝi komenciĝis. Tiu frandvespero estas konata kutimo ĉe

ILEI. Laŭ la konferenca libro aliĝis 79 personoj. Fizike aperis 74. Ili devenis el 26 landoj.

Ĉiuj preparlaboroj estis sukcesaj, ĉiuj alvenoj sekuraj, ĉiuj partoprenantoj sanaj.

La malfermo okazis la 20-a de julio ne solene, sed amike. Per plantado de arbo simbola la Komitato komencis sian laboron. La kvorumo estis atingita. La unua decido estis elekto de du novaj Honoraj Membroj : la forpasinta Profesoro Helmar Frank kaj Sinjoro Rob Moerbeek elektiĝis. Plia grava paŝo estis la elekto de 4 novaj sekcioj : Irano, Hispanio, Kongo RDC kaj Bulgario. Alia grava decido koncernas la revuon *Juna Amiko*, kies aperritmo saltos de 3 numeroj jare al 4. La Komitato aprobis la finanĉan jarkalkulon kaj la buĝeton. Same la raporton pri tutjara aktiveco.

Suna Montevideo ĝojigas ĉiujn. En la bankedo aperis la prezidanto de UEA Marc Fettes kaj la prezidanto de la Akademio Profesoro Christer Kiselman. Plie ĉeestis ekde la komenco la vic-prezidanto de UEA Stefan MacGill.

Specifa alineo koncernis la kontakton inter la prezidantino Mireille Grosjean kaj la redaktisto de la revuo *Esperanto* Fabricio Valle. Ili kune kaj komune skizis strategion por regula informado pri ILEI kadre de la revuo *Esperanto*.

Surstrata lingva festivalo kun afiŝoj kaj disdono de informiloj altiris la atenton de la publiko. Komenca franda vespero riĉa kaj varia, nacia vespero brila, internacia vespero gaja, multaj prelegoj interesaj, urbo mirinde bela kaj alloga, klimato agrabla krom iom da vento, ekskurso pluva sed bonhumora, interhomaj kontaktoj fruktodonaj, jen la ĉefaj trajtoj de tiu evento, grava en la vivo de nia Ligo.

Simpozio okazis ĵaŭde.

Laŭ decido de la Komitato eklaboris dumkonferenca komisiono kun tasko redakti rezolucion. Tiu dokumento estis traktita dum la fermo. Jen la rezolucio aprobata de la konferencanoj :

## REZOLUCIO

Okaze de la 60-jariĝo de la 1-a UNESKO-Rezolucio favora al Esperanto okazinta en Montevideo (UY) la **47-a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)**, samurbe, la 24-an de julio 2014, decidis kaj konigas :

Konsiderinte la 2-an Rezolucion de UNESKO en 1985 en Sofio (BG), kiu emfazas la atingojn de Esperanto,

Konsiderinte, ke Esperanto aperas sur la retejo de UNESKO apud la 6 laborlingvoj de UNESKO kaj la bulgara por prezenti la paroladon de la Ĝenerala Direktorino Sinjorino Irina Bokova por la Tago de la Patrino Lingvo je la 21-a de februaro 2014, Konsiderante la paralelecon de la celoj de Esperanto kaj UNESKO kaj la similecon de la alstrebitaj valoroj kiel respekto, solidareco, toleremo,

### **La konferencanoj rekomendas al UNESKO**

- noti la gravecon de la egalrajtiga, diskriminaci-malhela rolo de la Esperanto-instruado por pcedukado, en kiu la instruistoj praktikas ankaŭ utiligon de esperantlingva porpaca literaturo (la serio Oriento-Okcidento atingis kvindekda titolojn ne nur el Eŭropo kaj Azio, sed ankaŭ el Afriko kaj Sud-Ameriko), konsciigon pri diferencaj popolsintenoj, kulminaj en konflikt-situacioj ; ili praktikas konfliktsolvadon, sed ankaŭ la utiligon de verkoj rilataj

al UNESKO mem kaj la Homaj Rajtoj kiel la « Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj », « Paĉjo, kio estas rasismo ? » « Kio estas demokratio ? » kaj multaj aliaj.

- plu subteni tiun agadon de Esperanto-instruantoj.

### **ILEI volas**

Rekomendi al siaj sekcioj esplori pri la konsisto de sia nacia UNESKO Komisiono kaj ekrilati kun ĝi ;

Provi prezenti Esperanton al tiu instanco kaj krei daŭripovajn ligojn kun ĝi ekzemple per aliĝo ;

Rekomendi al siaj sekcioj konigi al siaj membroj la laboron de UNESKO kaj ties celojn kaj valorojn ;

Rekomendi al siaj sekcioj partopreni en la agadoj de UNESKO laŭ siaj ebloj kaj laŭ la lokaj cirkonstancoj ekzemple per kunlaboro por atingi la jarmilajn celojn de Unuiĝintaj Nacioj ;

Ek rilati kun la ĉefa sidejo de UNESKO en Parizo cele al depono de kandidatiĝ-dosiero por fariĝi Ne-Registara Organizo de tiu establo ;

Partopreni plej multe da laborkunsidoj en Parizo kaj eventuale en aliaj lokoj en la mondo sendante reprezentantojn laŭ la ebloj ;

Sendi al UNESKO agadraportojn kaj atestojn pri samcelaj aktivecoj ;

Sendi al UNESKO regule la du revuojn de ILEI : *Internacia Pedagogia Revuo* kaj *Juna Amiko* ;

Peti aŭspiciojn de la nacia UNESKO Komisiono por la Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto en Svislando kaj por ĉiuj ĉiujaraj Konferencoj kaj inviti tiun instancon al la malferma ceremonio de tiuj okazaĵoj ;

Utiligi en ĉiunivelaj kursoj materialojn pacedukajn, kulturdiskonigajn kaj sciencpopularigajn. Kunlabore kun interalie UEA vastigi la konojn pri la tuta mondo per verkoj en Esperanto, interalie per la serio Oriento-Okcidento nome per individuaj aŭ grupaj retradukoj aŭ almenaŭ resumoj de elstaraj eldonaĵoj rekomendataj de UNESKO ;

Helpi kompili bazan normliston de pacedukaj verkoj konendaj en Esperanto-ekzamenoj, kaj ĝin utiligi en la instruado ;

Helpi al Esperanto-instruantoj en malfavoraj cirkonstancoj akiri tiucelajn materialojn.

-oOo-

## **Salto el Oro al Argentino**

Ora estis nia konferenca semajno.

Vendrede la 24-an de julio grupo el 45 konferencanoj forlasis per buso la urbon Montevideo. Ni haltis en belega urbeto Colonia, mondheredaĵo de UNESKO, kaj povis tie promeni, rigardi la estuaron nomitan Rio de la Plata, observi ne konatajn amerikajn arbojn, atenti pri ne konataj birdopepadoj kaj tagmanĝi en bela suno. Per ŝipo la skipo veturis tra tiu mara-rivera bruna giganta akvosurfaco kaj atingis alian ĉefurbon Buenos Aires, Bonaero, ene de 75 minutoj.

Antaŭ ni staras la freneza UK-semajno, kie ILEI ludos centran rolon en la marda tuttaga kunsido Tago de Kapabligo, kun la nova nomo Tago de la Lernado, (antaŭe estis Tago de la Lernejo) konsiderante, ke la lernado ne nur okazas en la lernejo, sed en iu ajn loko, eĉ en iu buso aŭ trajno per la helpo de la poŝtelefona programo Esperanto Etape verkita de Stefan MacGill. La Tago de Kapabligo celas prezenti 3 kampojn : instruado de la lingvo, instruista trejnado (IT) kaj aktivula maturigo (AMO). La du unuaj kampoj estas la agadkampoj de ILEI. AMO estas en la manoj de UEA.

Informas Mireille Grosjean.

-oOo-

## Alvoko el Nepalo

Elkorajn salutojn el bela Nepalo.

Post la entuziasmo kreita de tre karaj kaj respektindaj fremdaj esperantistoj, kiuj de tempo al tempo vizitis nian landon, la lernantoj ĉe nia kolegio nomata Southwestern State College, Katmanduo, kaj ankaŭ ĉe niaj ligitaj lernejoj ekŝatas lerni esperanton por amikiĝi al la gejunuloj de la aliaj landoj kaj interkonatiĝi kun iliaj kulturoj. Do ni planas bonvenigi fremdajn esperanto-instruistojn, kiuj ŝatos volontule instrui Esperanton al niaj gelernantoj en Katmanduo kaj ankaŭ en aliaj distriktoj. Bonvolu vidi la jenan ligilon por havi pli da informoj :

<https://www.dropbox.com/s/mwxfq9gqis9lgmm/NI%20UR%C4%9CE%20BEZONAS%20VOLO%20NTULAJN%20ESPERANTO-INSTRUISTOJN%20EKSTERLANDAJN.pdf>

Samideane via

**Mian Salam SHANY**

- Internacia Ĵurnalisto
- Volontula Esperanto-Instruisto
- **Internacia Kunordiganto** ĉe Southwestern State College, Kathmandu, Filosofiska Nepal, Pri Esperanto Kursaro, Kultur-interŝanĝaj & Stud-programoj.  
Poŝtelefono: 00977 9843460851  
Retadreso: [m.s.shany@gmail.com](mailto:m.s.shany@gmail.com)

-oOo-

Ĉijare en januaro kaj februaro Charlotte Blanc Maillard kaj Sonia Daubercies studis esperanton en Ĉinio. Jen per citaĵoj el iliaj korespondaĵoj raporto pri ilia Ĉinio-umado.

Ni volis ŝanĝon kaj malkovron, kaj tio reale efektiviĝis !

Sed unua surprizo : Plej ofte estis ni la turisma allogaĵo ! verŝajne, ĉar ni parolis kun niaj ĉinaj gvidantoj kaj la tieaj homoj afable kaj rideme alproksimiĝis al ni por ricevi permeson efektiviĝi fotojn pri tiu kontakto inter ĉinoj kaj eŭropanoj.



Ĉiuj kontaktitoj estis tre akceptemaj kaj ĉiam serĉis kompreni, kion ni deziris. Ne estis multe da problemoj dank'al esperanto. Entute estis vere agrabla travivaĵo.

*La 1-an de januaro 2014 ili skribis :*

Feliĉe la vetero belas kaj iomete varmas tage. Tiam ni ĝuas pri la suneto ! Ĉar tie ĉi dom-hejtado ne estas konata. En restoracioj, vendejoj, muzeoj kaj publikaj lokoj ĝi ne ekzistas. Tial, kiel la aliaj, ni manĝas kaj muzeumas kun manteloj kaj ĉapeloj. (Vidu la foton sur la paĝo 36-a, kie ĉirkaŭ ronda tablo en Ŝanhaja restoracio Charlotte ekkutimas manĝi per bastonetoj en agrabla ĉeesto de ĉinaj gvidantoj. Fotis Sonaj, tial ŝi ne videblas.)

Nia unua vizio de tiu lando estis la Pekina flughaveno je la 25a de decembro 2013, giganta kaj modernega. El kie ni ne tro malfacile trovis nian flugvojon direkte al Ŝanhajo, urbo kie vivas 24 milionoj da loĝantoj.

Esperantistoj tie bonvenigis nin kaj kun ili dum du tagoj ni malkovris la malnovan urbon kaj ties templojn el la Ming-dinastio kaj la havenon kaj la bordon de la riverego Hangpau. Sed la poluo kovranta la urbon tiom densas, ke ne videblis la alia riverbordo ! La duan tagon kun niaj gvidantoj ni vizitis la grandan nacian muzeon, veran fonton de kulturo.

Per tre moderna kaj rapida trajno (po 300 km hore !) ni atingis Nankinon, kie atendis nin itala esperantisto vivanta en Ĉinio ekde 10 jaroj. Li estas tradukisto el la angla kaj itala al la ĉina, vivas en malgranda loĝejo sen tablo kaj seĝoj, kiel asketo ! Ni dormas ĉe li sur la planko sub kelkaj kovriloj, sed bona surprizo estas elektra hejtilo. Sed varma akvo ne ekzistas, do por duŝo ni atendas postajn tagojn.

Kun tiu samideano ni vizitas la Virinan Templon en tre granda ĝardeno. Per seĝotelfero ni atingas suprejon, kie nin atendas dikventra kaj ridema Budho. Oni rakontas, ke li tiom dikas, ĉar li manĝas la pekojn de la homaro kaj ke tio feliĉigas lin. Drako kaj diino lin protektas ĉirkaŭ tiu monto, kies supro atingeblas per miloj da ŝtuparoj. Multe da personoj supreniras piede kaj haltas sur haltejoj por gimnastiki. Tio similas al niaj « Vita »-vegoj !

Revenintaj en la valon ni poste vizitis belegan tombejon de la Ming-dinastio, sed ne plu restis tempo por la muzeo. Tio ne tro gravis, ĉar ni estis vere lacegaj !

La sekvan tagon je la 1-a de januaro ni flugis al Xian, en kies flughaveno nin atendis ĉarma junulo kun esperanto-flago, kaj buse kun li ni atingis la budhisman monaĥejon Tiefosi, kie la monaĥo Miaohui prizorgas budhisman radion, esperantigas ĉinajn librojn kaj organizas esperanto-kursojn. La monaĥejo ankaŭ ne estas varmigita, do ni manĝos silente en nia mantelo kaj sub nia ĉapo, tio per bastonetoj, en komuna manĝejo kun la monaĥoj, servantoj kaj malriĉuloj. (Vidu la foton sur la paĝo 35-a)

Dum tri tagoj ni ellitiĝos je la 05h30, matenmanĝos je la 06h00, tagmanĝos je la 11h30 kaj vespermanĝos je la 17h30.

La menuoj 3-foje tage konsistos el rizsupo sensala, blanka rizo ankaŭ ne salita, miksitaj kuiritaj legomoj kaj unu frukto. La nacia trinkaĵo konsistos el varma akvo, teo estus lukso, kaj nekonata estas kafo.

Ni partoprenas tie kun studentoj mondan preĝon por la paco. En la templo ni estas konsiderataj kiel honor-gastoj.

Post tiuj spartaj kondiĉoj ni veturis al Xian kaj loĝas en hotelo, kie ni fine duŝas nin kaj povas bone dormi. Inter Svislando kaj Ĉinio horare estas 7-hora diferenco. Ni vizitis la faman koto-teran armeon kun nia juna esperanta gvidanto Deviso. Kaj la sekvan tagon sub bela blua ĉielo ni malkovris la grandan ĉirkaŭmuron de la malnova urbo (13-km longan). Sekvis vizito de pagodoj kaj temploj.

Pludaŭras niaj ĉinaj aventuroj. Post ununokta trajnvojaĝo ni atingas Chongqing kun 18 milionoj da loĝantoj. Denove afabla esperantisto gvidas nin dum 3 tagoj en tiu urbego. Ni vespermanĝas en fama bela turnanta restoracio je la 22-a etaĝo de la ĉielskrapulo. Nun por ni ne plu estas problemaj niaj manĝbastonetoj. Ni gustumas vapor-kuiritajn arakidojn, lotus-radikojn, serpenton, ktp.

Sekvontage en domo de amikoj ni manĝis koko-krurojn. Ili speciale aĉetis tion por honorigi nin, estas la novjara festo por ili. Ni estas 14 personoj en la ununura ĉambro familia (Vidu la foton sur la paĝo 35a). Kun la ĉina fonduo ni evitas la verdajn bufojn, feliĉe ni povis elekti la ingrediencojn, kiel ĉe ni por la picoj.

Vespere en tiu granda urbo defias kristnaskaj abioj, reklamaj lumbildoj. Inter ili ni bone rigardis kaj fotis la kastelon de Chillon kaj la alpan supron de Cervino/Matterhorn. Tiel oni ne tro rimarkas la ĉiutagan densan poluadon kaj la senĉesan trafikbruon.

Ni travivas humurajn momentojn, kiam ni uzas la publikajn necesejojn, komunajn kaj senpordajn. Ne estas tempo por revestiĝi antaŭ ol ŝprucas akvo, kiu duŝas niajn piedojn ! Kelkfoje virino venas kun balailo por purigado. Tio okazas tre malofte kaj plejparte regas nekredebla malpuro.

Ni uzis telferon por transveturi la faman riveregon Yang Tse. Tiel ni atingas la urbon Chengdu kun panda infanejo. (Vidu la foton sur la 36-a paĝo.) Manĝi kaj dormi estas la filozofio de tiuj bestoj. Sed ili manĝas nur bambuojn, kio digeste ne alportas al ili multe da energio. Ĉu vi scias, ke ekzistas ruĝaj pandoj, pli malgrandaj, kaj similaj al simioj, kiuj facile grimpas sur arboj ?

Malnovaj busoj kondukas nin al montara loko, kie ni deziris viziti taoistajn templojn. Sed ili situas tre tre alte. Charlotte ne plu kapablis nombri la ŝtupojn. Tamen ŝi rifuzis portistan helpon. Vere laciga ekskurso.

Sed Charlotte festas hodiaŭ sian 70-an naskiĝtagon kaj vespere kun niaj ĉinaj amikoj ni frandas strangaĵojn. Ekzemple centjarajn ovojn tute ne kuiritajn, kies blanka parto malmolas kaj malhelbrunas, kaj la flava parto nigras, tio estas bonega frandaĵo !

Sekvas nokto en trajno dum 22-hora veturado por atingi Kunming. En la vagonkupeo estas 3 etaĝoj kun 6 litetoj. Ni ricevis la numerojn 1 kaj 2 situantajn sur la supra etaĝo, sed Charlotte tuj diras, ke ŝi ne volas kaj ne povas grimpi tiel alten. Bonŝance ŝi amikiĝis kun junulo, kiu afable lasis al ŝi sian malaltan liton. Por Sonia estis tute simple, ŝi gimnastikis al la tria etaĝo kaj tamen bone dormis.

En Kunming la kutima rito atendas nin : esperanta flago kaj konduko al nia hotelo. Ni vizitis kaj vagadis en giganta ŝtona labirinto. En tiu parko homoj dancis, kantis, ludis, trinkis teon, ĵetis panon al la mevoj. Vere estis kiel impresionista pentraĵo.

Vespere riverborde ni malkovras laboristojn, kiuj pretigas novjarajn festaĵojn. Sed ni devas plue veturi aviadile al la insulo Hainan, la celo de nia ĉina aventuro. Ni alvenas sur tropikan insulon kun kokos- kaj papaj-arboj, sablaj plaĝoj. Sur la stratoj libere promenadas bovinoj, kaprinoj kaj eĉ kokinoj. La maro forĵetas amason da rubaĵoj sur la sablon, kio ne tre plaĉaspektas, sed malgraŭ tio Sonia banis sin en la Suda Maro ; ventas kaj la akvo pli varmas ol la aero. Multas la velbretistoj kaj kun dana esperantisto ĉiuj saltis en la ondojn kiel infanoj. Charlotte ne emis eniri la akvon.

Ni loĝas en lernejo borde de la maro, estas simpatia kaj pli trankvila loko, ol en la urba universitato, kie pasintjare okazis la esperanto-kursoj. Niaj horaroj similas al tiuj de la infanoj, manĝoj, paŭzoj, inklude sieston.

Morgaŭ aliaj studentoj alvenos kaj ekestos serioza studvivo dum unu monato. Ni estas 8 eksterlandanoj el kiuj 4 volas trapasi la diplomon por instrui la lingvon esperanto.

Hodiaŭ estas luksa tago kun elektro kaj interretaj konektebloj, trinkebla varma akvo. Por la duŝo : ne sonĝu ! Ni devas iri en la lavĉambrom de alia domo, kie estas tubo apud antikva lavaŝino, kun malmulte da akvo sen premo. Ŝajnas, ke estas la sola pordo fermebla kun riglilo.

Ni provis sendi poŝtkartojn per la raraj poŝtkestoj en la grandaj urboj, sed oni diras, ke tio estas vera loterio. Ni kuraĝigas la sendintojn kaj gratulas la gajnontojn. Laŭ la dana esperantisto, kiu partoprenas jam duafoje la studadon, neniam poŝtkarto atingis sian celon. Pli ol 30 ni estis sendintaj.

Charlotte ricevas SMS de Viktoro el Hungario ĵus ricevinta ŝian poŝtkarton ! En Ĉinio tamen ĉio eblas !

Ni malkovras la nacian trinkaĵon, kiu tute ne estas teo, kiu tro multekostas, sed nur varma akvo. Ĉiuj promenas (ankaŭ ni) kun alumina termosoj, kiun oni povas senpage plenigi ĉe distribuiloj.

En la lernejo la vivkondiĉoj estas spartecaj, kio por ni estas iomete lacige, sed oni vidas, ke ili faras ĉion por agrabligi nin. Ni studas en Konfucius-lernejo malproksime de la ĉefurbo Haikku. Estas loko trankvila, dum la paŭzoj la infanoj vigligas la lokon.

Nia loĝejo konsistas el unu dormoĉambro kun vido al la maro. Ambaŭ litoj estas simplaj lignobretoj kun kuseno, maldika kovrilo, malgranda ŝtofpeco rolas kiel littuko. Tuj ni decidis trovi matracon. Post 3-hora busveturo ni trovas la solan vendejon, en kiu troviĝas nur unu modelo kun larĝo 50-centimetra. Ni petas pli grandan larĝon, sed ne ekzistas alia elekto.

Ĉambre du plastaj helbluaj seĝoj kaj malgranda tablo, tio estas nia meblaro ! La fenestroj ne estas bone fermeblaj, do nokte envenis sciuro por ludi kun niaj riz-bulketoj kaj biskvitoj troviĝantaj sur la kuseno de Charlotte kaj en la banĉambro. Ŝi pensis, ke esti mi, kiu ludis !

Kun peco da kartono kaj papero ni ŝtopis la breĉojn. Sed la sekvajn noktojn venis kuloj, kiuj celis piki nin. Bonŝance alian nokton venis geko sur nian kusenon, kaj feliĉe ĝi manĝis la kulojn. Por fermi la pordon ni utiligis brikon. En la banĉambro estas man-lavujo kaj banujo kun neuzebla tubeto, sed nur kun malvarma akvo, kaj ambaŭ sen ŝtopiloj. Sed ni bonŝancas, ni havas veran raraĵon en tiu lando : normalan necesejon.

Kiel ni jam diris, por la duŝo ni promenas al la lavejo, kie oni povas samtempe lavi siajn vestaĵojn per antivaj lavmaŝinoj, sed tio eblas nur post minimume 2-hora atendado por disponi pri iomete da varma akvo. Ni ne plendas, ĉar vere ni bonŝancas, nia ĉambro estas la plej granda.

Ambaŭ responsuloj loĝas en malgrandaj ĉambroj, kaj iliaj necesejo kaj duŝejo troviĝas koridore. Sur la teretaĝo samas, por la junuloj troviĝas 2 ĉambroj kun po 8 supermetitaj litoj, sed nur unu sola necesejo kaj duŝejo por ĉiuj.

La komuna salono konsistas el du partoj, la plej granda kiel studejo kaj la alia kiel manĝejo. Ĉiu ricevis proprajn ladferajn teleron kaj kuleron.

La vegetaranaj manĝoj konsistis matene el riz-kaĉo miksita al tre longe kuiritaj legomoj, el speco de vaporpano kaj blanka rizo. Tagmeze kaj vespere samis kaj malofte aldoniĝis iomete da arakidoj, pecetoj da terpomoj aŭ da tofuo aŭ riz-nudeloj. Tio tri-foje tage kaj sep-tage semajne.

En granda silento ni manĝas, la ĉinoj la kapon en la telero. Ni ambaŭ ridetas silente dirante nenion, ĉar por ni estis ridinda tiu etoso.

Ni revis pri bona pano kun butero kaj konfitaĵo ! Nia lasta ĉokoladplato defiis nin. Ni atendis la lastan tagon por frandi ĝin.

La junuloj aĉetas kokakolaon, biskvitojn kaj bombonojn en kabanaĉo. Ni malkovris, ke tiuloke troviĝas biero, do vespere nia ĉambro fariĝis la parolejo kaj drinkejo de la lernejo.

Kelkfoje dum la tagmeza paŭzo ni busis al Quilin jan, kie aĉetebilis kelkaj fruktoj.

Ni estis tie por lerni la lingvon. Estis granda surprizo por Charlotte, kiu aliĝis por studi por po 2-studhoroj tage kaj Sonia por po 4. La ĉinaj studentoj ne jam ferias, do okazis nur unu kurso. Kaj Charlotte respondecis pri la esperanto-instruado al la ĉarma surloka ĉina instruistino, kies edzo fariĝis la instruato de Sonia. Ambaŭ neniam estis aŭdintaj paroli pri la lingvo internacia. La aliaj partoprenantoj laboris duope, ili venis el Usono, Koreo, Hong-Kongo, Manĉurio kaj el la insulo Hainano mem.

Jen nia horaro : Ellitiĝo je la 7-a. Eklernado ekde la 8-a ĝis la 12-a laŭ ritmo de po 50 labor-minutoj kaj 10 paŭz-minutoj. Sekvis tagmanĝa paŭzo kaj rekomenciĝis la studo de la 14-a ĝis la 18-a horo. Kaj tio dum 6 tagoj semajne.

Vivu la emeritiĝo ! Speciale por Charlotte ! Nekredeble, ni rifuzis la vesperan studon de la 20-a ĝis la 22-a por povi fari niajn hejmtaskojn en nia propra ĉambro, kun akompano de glaso da biero kaj ridado pri tiu situacio, kiu tiel pli agrablis. Kaj tamen ni tre bone senerare sukcesis la unuan ekzamenon.

La junaj ĉinaj studentoj alvenis je la dua semajno, ili estas komencantoj. Do formiĝis 2 studgrupoj. Vera serioza vivo komenciĝis. Do sen vera volo ni estas 5

personoj, kiuj sekvas la intensivan kurson por fariĝi esperanto-instruistoj. Kun surprizo Charlotte tiel malkovras mire multe da franclingvaj gramatikaj terminoj. Kion volas esprimi la profesoro per tiuj rektaj objektoj, senobjektaj verboj, transitivaj aŭ ne. Por ŝi la aktivoj kaj pasivoj estas bank-terminoj ! Kaj tamen ŝi ne havas problemojn kun esperanto mem.

Semajnfine rekomenciĝas la ĉina novjara festado, kiel cetere ĉiuvespere... La studentoj rehejmiĝas, kelkaj ne revenos. Dum du semajnoj tage kaj nokte petardaj eksplodoj onidire fuĝigas la malbonajn spiritojn. Por ni tio iĝas pli kaj pli neeltenebla. Nia profesoro kun orelprotektiloj ludas gitaron kaj kantas plengorĝe ĉine, esperante kaj angle. Nia kvieteco tre relativas !

La dimanĉo estas libera tago, sed fariĝas vera ekspedicio por viziti la Vulkanan Ĝardenon, ĉar ne estas buso pro tio, ke la ŝoforo ferias. Sed la filino de la lernejestro efektivas plurajn veturigojn, por konduki nin al la urbo, en kies parko ni povis surgrimpi kaj eniri vulkanon. Ni plezure ellernejiĝis.

Kelkfoje ni banis nin en la naĝejo de najbara hotelo aŭ en la maro. Ni spektis la malfermon de la Olimpiaj Ludoj okazantaj en Sotchi, tio en la hotela haŭlo. Kaj kiam la junuloj havis emon purigi lokon sur la plaĝo, tiam vespere ni kantis ĉirkaŭ fajro.

### **La 25an de februaro 2014**

*Tiel Charlotte kaj Sonia konkludis sian lastan leteran raporton al geamikoj :*

Kiam alvenas la 4-a studsemajno, tiam la kursoj iĝas pli kaj pli interesaj, kaj post kelkaj tagoj antaŭ ĝia konkludo ni ekzameniĝis kun la espero sukcesi kaj ricevi diplomon. Kaj fakte ni forflugis el Ĉinio en posedo de la koncerna atestilo pri kapablo instrui esperanton.

### **Postvortoj de Claude Gacond.**

*Tiu Ĉinio-umada aventuro de Charlotte Blanc Maillard kaj Sonia Daubercies vige impresis min. Do ekde nun en Svislando ni povos profiti pri la spertoj pedagogiaj kaj ankaŭ homrilataj, kiujn ambaŭ certe akiris en Ĉinio.*

*Kiam en la kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento ni ekpraktikis esperanton okaze de skiferia loĝado en primitiva alpa ĉaledo en la valo Bonderlen super Adelboden, tiam ankaŭ ni travivis similajn spertojn : kuirejo nevarmigebla transformiĝinta al speco de glaĉero, necesejo en kabano je centoj da metroj for de la ĉaledo atingebla nur post kuraĝa promenado en neĝŝtormoj, dormejoj surplankaj malvarmegaj. Sed tiuj cirkonstancoj certe ne malhelpis nin bone skii kaj entuziasme enprofundiĝi en la praktikon mem de esperanto.*

*Tutcerte Charlotte kaj Sonia revenis el Ĉinio ne nur pli spertaj pri esperanto mem kaj kun instru-diplomo enpoŝe, sed ankaŭ pli konsciaj pri la neordinara privilegio rilatiga kun nesamlingvanoj, kiun alportas al ni la reala esperanto-pratikado.*

-oOo-





En Chongqing novjara festado en ĉambro de la familio Tuaho. Charlotte kaj Sonia ĉirkaŭataj de 12 ĉinaj geamikoj.



En Tiefosi ĉe la budhisma monaĥejo la partoprenantaro al la preĝo por la mondpaco. La monaĥo Miaohui staras inter Charlotte kaj Sonia.





En Chengdu dum la irado al la panda infanejo.



En Ŝanhaja restoracio, kie Charlotte ekkutimiĝis manĝi per bastonetoj en ĉeesto de afablaj lokaj esperantistoj. Fotis Sonia Daubercies.